

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

75-jara jubileo de BEA

•
Festaj
salutparoloj

•
Niaj jubileaj
tagoj


•
Rikaj kulturaj
arangoj

•
Al la 75-jara
BEA

•
Grava rekono

•
Reĥoj pri nia
jubileo

•
Sur internacia
scenejo





Sava Dalbokov dekoras la asocian standardon per la aligrada ŝtata ordeno



DEKRETO

N-ro 2521

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario, surbaze de artikolo 93, punkto 23 de la Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario

DEKRETAS:

DISTINGAS la Bulgaran Esperantistan Asocion per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — III grado, pro ĝia kontribuo por plivastigo de la internaciaj kontaktoj de nia lando kaj lige kun ĝia 75-jara jubileo.
Sofio, 22-an de septembro 1982

Prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario: T. JIVKOV

Sekretario de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario: N. MANOLOV

REZOLUCIO

Por ĉesigo de la agreso en la Proksima Oriento, por malmado kaj paco en la tuta mondo

Al s-ro XAVIER PEREZ de CUELLAR, Ĝenerala Sekretario de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, Nov-Jorko

Sinjoro Ĝenerala Sekretario,

Ni la partoprenantoj en la Internacia Scienc-Praktika Konferenco, kunvokita en urbo Veliko Tarnovo, PR Bulgario, kaj dediĉita al la 75-jariĝo de unu el la plej malnovaj esperantistaj organizaĵoj en la mondo — la Bulgara Esperantista Asocio (BEA), sin turnas al Vi kun apelo, ke Vi kontribuu por utiligo de la kunsidoj de la Ĝenerala Asembleo de UN por solvo de tiuj plej senprokrastaj problemoj, de kiuj dependas la paco en la mondo kaj la konservo de la homaj kulturo kaj civilizo, nome:

1. Oni apliku ĉiujn fortojn de UN por tuja ĉesigo de la subtenata de Usono indigna agreso de Israelo en Libano, por retiro de ĉiuj israelaj armetrupoj el la kontraŭleĝe okupita teritorio de Libano, por garantio de la sendependeco kaj suvereneco de Libano.

2. Por justa solvo de la palestina problemo en la spirito de pli fruaj decidoj de UN kaj de la decidoj de la Konsilio de Reprezentantoj de la Arabaj Ŝtatoj kaj Registaroj okazinta antaŭ nelonge en urbo Fes, Maroko, nome:
— estu liberigitaj ĉiuj arabaj teritorioj, kontraŭleĝe okupitaj de Israelo per la agresa milito en 1967
— estu garantiita la rajto de la palestina popolo pri memdecido kaj pri kreo de sia suverena ŝtato
— estu garantiita al ĉiuj ŝtatoj en la regiono, inkluzive al Israelo, la rajto de sekura kaj sendependa ekzistado kaj evoluo.

La rolon de garantianto oni povas komisi al la Konsilio de Sekureco de UN.

3. UN prenu la iniciaton pri kunvoko de Tutmonda Konferenco pri Malmado, kiu faru decidojn pri stabiligo de la nuna nivelo de armilprovizado, proksimume egala por la grandpotencoj, kaj pri malpliigo, entute aŭ parte, de la raketoj kun meza radiuso de funkciado ĉe plena observo de la principo pri egala sekureco, kaj ke ĉiu ŝtato produktanta nukleajn armilojn solene promesu, ke ĝi ne aplikos kiel unua nukleajn armilojn, kiel tio jam estis farita de Sovet-Unio kaj aprobita de vi mem ĉe via antaŭnelonga oficiala vizito en USSR.

Ni la reprezentantoj de pacama kultura movado por komprenigo kaj amikeco inter la popoloj, kia sendube estas la tutmonda esperantista movado, esprimas nian profundan konvinkitecon, ke nur tiamaniere la homaro estos savita de nuklea katastrofo, de fizika kaj biologia neniigo kaj degenerado.

Ni esperas, sinjoro Ĝenerala Sekretario, ke Vi faros ĉion eblan, por ke tiurilate la laboro de la Ĝenerala Asembleo de UN estu plene rezultodona.

Urbo Veliko Tarnovo
25. 9. 1982

De la partoprenantoj en la Nacia
Scienc-Praktika Konferenco

Prezidanto de la konferenco: N. ALEKSIEV



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51
OKTOBRO
10 • 1982

GLORA 75-JARA JUBILEO DE BEA

SALUTPAROLO

De SAVA DALBOKOV — unua vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto al la Scienc-Praktika Konferenco „75 jarojn BEA“

Karaj bulgaraj esperantistoj!

Estimataj gastoj!

Mi sentas ĝojan emocion saluti en la nomo de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto vian Scienc-Praktikan Konferencon, dediĉitan al la 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio. Tiu ĉi emocio venas ne nur pro la alta pritakso de la agado de l'bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ pro la fakto, ke mi mem ĉi tie, en Veliko Tarnovo, en tiu ĉi glora malnova bulgara ĉefurbo, dum la jaroj de mia juneco, lernis la Internacian Lingvon Esperanto kaj aktive laboris en la vicoj de la bulgara E-movado. Pri tiu tempo mi por ĉiam konservis neforgeseblajn rememorojn. Tio estis la tempo de nia RMS¹-juneco, kiam ĉiuj progresemaj fortoj de nia popolo batalis en komuna unueca fronto kontraŭ la faŝismo kaj milito, por demokratia evoluo de nia lando, por paco kaj amikeco en la tuta mondo. Tio estis la jaroj, kiam ankaŭ la bulgaraj esperantistoj aktive partoprenis la batalon kontraŭ la ekspluatantoj, la tiranoj kaj la murdistoj de l'popolo, por faligo de la sanga monarkofaŝisma diktaturo, por savo de Bulga-

rio de la minacanta katastrofo. La E-movado en sia plejmulto estis parto de la tutpopola kontraŭfaŝisma movado en nia lando. En ĝiaj vicoj elkreskis kuraĝaj kaj sindonaj batalantoj-kontraŭfaŝistoj, kiuj en diversaj formoj partoprenis la batalon — kiel popolaj partizanoj, partizan-helpantoj kaj kaŝantoj, kiel aktivaj kontraŭfaŝistoj. Centoj da bulgaraj esperantistoj donis en tiu peza batalo la plej karan — sian vivon. Iliaj nomoj brilas kun neestingebla lumo en la panteono de la batalantoj por popolaj libereco kaj feliĉo. Sufiĉas nur menciil la nomojn de la pereintaj kontraŭfaŝistoj-esperantistoj — Vela Piskova, Jordan Ljutibrodski, Nikola Botuŝev, Nikola Šopov, Ĥristo Karpashev, Stojan Edrev, d-ro Varban Genčev, Dičo Petrov, d-ro Stojan Stojanov, Cvetan Spasov, Bratan Sukerov, Vela Peeva kaj multaj aliaj. Pri ili fieras la tuta bulgara popolo. Pri ili fieras ankaŭ la bulgaraj esperantistoj.

Glora estas la vojo de BEA dum ĝia 75-jara ekzisto. Ĝi suferis la batojn de multaj reakciaj reĝimoj, en la jaroj de la Dua Mondmilito ĝi estis eĉ malpermesita fare de la faŝista registaro, sed ĝi eltenis. Riĉan sperton, fortojn kaj saĝon akumulis BEA dum tiuj pezaj jaroj,

¹ RMS — Laborista Junulara Asocio

por atingi tion, kio ĝi estas hodiaŭ kaj por atingi multon morgaŭ.

Post la popola venko je la Naŭa de Septembro 1944, kiam venis la longe sopirata libero, por la bulgaraj esperantistoj, samkiel por la tuta bulgara popolo komenciĝis nova erao. La popola registaro helpis kaj helpas la noblan laboron de l'esperantistoj. Plej elokventa esprimo de tiu ĉi helpo estas la enkonduko de fakultativa instruado de Esperanto en la mezgradajn bulgarajn lernejojn. Siaflanke la esperantistoj aktive kaj konscie partoprenas la socialisman konstruadon en nia lando, la laboron por senĉesa plialtigo de la vivnivelo de nia popolo, la noblan kaj tre delikatan laboron por estigo de nova homo en nia lando — homo kun vastaj kulturaj intereso, kun alta civitana konscienco kaj disciplino, kun profunda patriotisma kaj internacia eduko, kun spirito de profunda demokralismo kaj humanismo. Per sia laboro kaj batalo la bulgaraj esperantistoj meritas la altan rekonon kaj kuraĝigon de la instruanto kaj gvidanto de nia popolo Georgi Dimitrov, kiu fiksas la vojon de konstruado de nova socialisma Bulgario. Dimitrov diris al la esperantistoj: „Via agado per Esperanto estas valora. Vi devas daŭrigi tiun agadon.“

La daŭriganto de la fero de Dimitrov, k-do Todor Živkov, ankaŭ kuraĝigas la bulgarajn esperantistojn. Post la Aprila Plenkunsido (1956) de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio ĉiuj fortoj estis direktitaj al impeta movado antaŭen, al rapida konstruado de la nova vivo. Ni fieras, ke ankaŭ la bulgaraj esperantistoj donis sian kontribuon al tiu ĉi movado antaŭen, al socialismo. Ili entuziasme konstruas novan Bulgarijon kaj samtempe bonege popularigas ĉion bonan, kion kreis la bulgaraj manoj kaj spirito dum la jarcentoj. La gloran historion de nia malgranda, sed kun alta kulturo popolo la bulgaraj esperantistoj popularigas tra la tuta mondo, aparte la sukcesojn de la reala socialismo en Popola Respubliko Bulgario.

Nia popolo, kiu tre bone konas la amaron de la fremda jugo, la teruraĵojn kaj la maljustaĵojn de la monarkofaŝisma regpotenco, estas tamen fidela batalanto por paco kaj kultura progreso, por amikeco kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj. Tio estas la sincera politiko ankoraŭ de

nia popola registaro. La bulgaraj esperantistoj rakontas al la tuta mondo pri la pacamo kaj humanismo de nia popolo, pri ĝia ĉiam viva internacia sento, pri ĝia preteco helpi kaj per vortoj, kaj per faroj ĉiun batalon por libereco kaj justeco en ĉiu angulo de la tero. En tiu ĉi fronto la bulgaraj esperantistoj havas aparte gravan taskon. Kaj ili vere mcrŝas en la unuaj vicoj de la tutmonda E-movado por paco. Hodiaŭ la mondo estas konsternita pro la sangaj malbonfaroj de la israelaj agresuloj, kiuj en Libano faris barbaraĵojn, egalajn al tiuj de la hitleranoj dum la Dua Mondmilito. La bulgaraj esperantistoj akre protestas kontraŭ la indignaj agoj de la israelanoj kaj ties transoceanaj inspirantoj kaj protektantoj. Ili volas, ke oni solvu la disputajn problemojn per pacaj intertraktadoj; ili postulas malpermeson de la atomaj armiloj por amasa ekstermo de la homaro, postulas malarmadon kaj malstreĉigon de la internaciaj rilatoj de paco kaj paca kunvivado de la homaro. En tiu batalo la bulgaraj esperantistoj disponas pri bonega armilo — la Internacia Lingvo Esperanto. Per ĝi ili batalas kaj devas ĉiam pli aktive batali por vastigo de la amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj de la socialisma tendaro, kun la progresmaj kaj pacamaj homoj en la tuta mondo. Ili ĉiam estu plej aktiva taĉmento de tiu fronto.

En la nomo de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto mi bondeziras novajn, ĉiam pli imponajn sukcesojn al la bulgaraj esperantistoj en tiu granda batalo de nia nuntempo. Mi bondeziras al ili novajn, ĉiam pli grandajn sukcesojn en la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto inter la bulgara junularo, inter la intelektuloj, inter la bulgaraj laboristoj kaj vilaĝanoj, inter ĉiuj bulgaraj laboruloj!

Vivu kaj progresu la Bulgara Esperantista Asocio — unu el la plej fortaj taĉmentoj de la tutmonda E-movado!

Per Esperanto — por la socialisma patrolando, por paco kaj progreso, por feliĉo de la tuta movado!

Vivu la Bulgara Komunista Partio — la saĝa gvidanto de nia popolo en la batalo por socialismo kaj paco!

NIA 75-JARA JUBILEO

(1907—1982)

HRISTO GOROV,
prezidanto de BEA



En la nuna jaro, dum kiu nia popolo kaj la progresema homaro celebras la 100-an naskiĝtagon de la granda filo de Bulgario — Georgi Dimitrov, oni komencas en internacia skalo la preparlaborojn por la 100-jara jubileo de Esperanto. Nun la Internacia Lingvo atingis 95 jarojn, kaj Bulgara Esperantista Asocio — 75 jarojn.

Pasas la jaroj, pasas la jardekoj. Alternas generacioj. . .

La unuaj pioniroj eklaboris preskaŭ samtempe kun la apero de la Unua Libro de Esperanto. En la lasta kvarono de 19-a jarcento Bulgario, ĵus liberigita el sub otomana jugo, estis grave postrestinta en sia ekonomia evoluo, sed la popolo estis ege sciama. Sub influo de la progresema rusa kulturo ekgermis la spirita vivo. La unuaj informoj pri Esperanto venis al nia lando per la ruslingvaj revuoj „Niva“ (Grenkampo) kaj „Russkij Vestnik“ (Rusa Informilo). Formiĝis politikaj kaj kulturaj organizaĵoj, inter ili la partio de la laborista klaso, nuntempe avangardo de nia popolo en la socialisma konstruado.

Oni eniris en la 20-an jarcenton — epokon de grandiozaj inventoj en la sfero de scienco kaj tekniko. La spirito de la nova jarcento favoris nian aferon. Kreskis la nombro de esperantistoj en nia lando. La iniciaton pri fonda de Esperanto-Asocio prenis sur sin la aktivaj esperantistoj en Tarnovo, kies klubo funkciis de 1896. En tiu pitoreska urbo, fama pro sia glora pasinteco, iama ĉefurbo de la Dua Bulgara Regno, inter la 6-a kaj 19-a de aŭgusto 1907 okazis la fondkongreso de la Bulgara Esperanto-Ligo. Ĉeestis 26 delegitoj reprezentantoj de 14 societoj.

La nomo de la Asocio ne restis la sama. Post 1911 oni nomis ĝin Bulgara Esperantista Societo. En 1926 ĝi ricevis sian definitivan nomon — Bulgara Esperantista Asocio (BEA).

Jam ĉe la unuaj paŝoj de Esperanto en nia lando oni metis ĝin en servo de nia popolo. En la unua numero de gazeto „Rondiranto“ la redakcio deklaris: „Ni celas ne nur propagandon de Esperanto, ni celas ankaŭ doni eblecon al fremdlandaj legantoj ricevi impresojn pri nia belega lando, pri la bulgara literaturo“.

Multaj spertaj tradukistoj transprenis la taskon konigi al la cetera mondo verkojn de bulgaraj poetoj kaj verkistoj. Kiel tradukistoj distingigis Kr. Sevriev, Ivan Krestanov, Atanas D. Atanasov (ADA), Georgi Atanasov, Ivan Dobrev, Asen Grigorov, Simeon Hespăciev, Simeon M. Simeonov k. a. En 1925 aperis „Bulgara Antologio“, kompilita de I. Krestanov; en ĝi estas prezentitaj la plej konataj bulgaraj poetoj kaj rakontistoj. En Esperanto aperis verkoj de Hristo Botev, Ivan Vazov, Todor Vlajkov, Aleko Konstantinov, Petko R. Slavejko, G. P. Stamatov, Elin Pelin, Jordan Jovkov k. a.

Oficialaj institucioj en nia lando rilatis favore al Esperanto. Jam en 1912 la Ministerio de Klerigado en speciala cirkulero rekomendis la lernolibron de Ivan Krestanov. En 1920 la sama ministerio rekomendis la lingvon al la direktoroj de la mezgradaj lernejoj. En 1921 per dekreto Esperanto estis oficiale enkondukita kiel fakultativa lernobjekto en la lernejojn. Ekde la lernojaro 1981/1982 la Internacia Lingvo denove estas fakultativa

lernobjekto kaj tio malfermas novan paĝon en la historio de la Esperanto-movado en Bulgario.

En la periodo post la Unua Mondmilito granda parto de la esperantistoj simpatiis al la ideoj de Lenin. En 1921 oni fondis la organizon „Balkana Liberiga Stelo“ kun la celo meti Esperanton en servo de la laborista klaso. Meritplenaj agantoj estis Panajot Kolev, Angel Nikolov kaj Meleško Siškov.

Heredanto kaj daŭriganto de „Balkana Liberiga Stelo“ estis Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA), kiu faris siajn sukcesajn paŝojn dum la jaroj de nova proleta impeto (1929—1930). Presorgano de BuLEA estis „Balkana Laboristo“, poste „Internacia Lingvo“ kaj „Laborista-Kampana Korespondanto“. BuLEA eldonis PEK-bultenon, kiu prezentis faktojn el la bataloj de la bulgara laborista klaso. La Laborista E-Asocio aliĝis al la Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE), kontaktis kun frataj organizoj en Sovet-Unio, Germanio, Francio, Britio ktp. En la gvidorganoj de BuLEA aktivis Nikola Aleksiev, Asen Grigorov, Angel Petkov-Angelo, Simeon Petrov, Kosta Penev, Atanas Lakov, Trajana Petkova, Vasil Bozarov k. a.

Post kiam oni malpermesis la agadon de BuLEA, la laboristoj-esperantistoj transiris organizite en la vicojn de BEA kaj tiu ĉi forto akcelis la aferojn de BEA. En la antaŭmilita periodo aktive laboris d-ro Stojan Guĝev kiel prezidanto de BEA, Ivan Keremidĉiev, Georgi Dolapĉiev, Violin Oljanov, Vasil Bozarov, Ivan Bataklijev, Trifon Hristovski k. a. Pro la senĉesa polica teroro la agado de BEA fariĝis ĉiam pli malfacila. Oni devis lerte sin adapti al la novaj kondiĉoj. Eltrovataj aktivuloj gajnis tribunon en la ĉiutagaj gazetoj „Zarja“ kaj „Kambana“.

Dum la kontraŭfaŝisma rezistado centoj da bulgaraj esperantistoj partoprenis la vicojn de partizanaj taĉmentoj kaj batalgrupoj. Dekoj da kamaradoj pereis kiel partizanoj aŭ estis pendumitaj en malliberejoj. Por la libero falis Nikola Sopov — sekretario de BuLEA, Nikola Botuŝev — gvidanto de batalgrupo en Sofio, David Sasonov — tradukisto, Angel Petkov — Angelo, Stojan Edrev, la poetoj Hristo Karpaĉev, Hristo Kozlev kaj multaj aliaj.

BEA trairis dornan vojon dum la militaj jaroj, sed la persekutoj nur hardis ĝiajn aktivulojn. Ili daŭre batalis kontraŭ la faŝismo kaj militarismo, por restarigo de la paco.

La nova periodo komenciĝis post la Dua Mondmilito. La Asocio rapide restarigis siajn vicojn sub la prezido de d-ro Stojan Guĝev. La kondiĉoj estis tre favoraj dank'al la popola regpotenco, kiu subtenis nin morale. En

1945 okazis la unua postmilita kongreso kaj komencis aperi revuo „Internacia Kulturo“ sub la redaktado de Asen Grigorov. Sekvis la landaj kongresoj en Asenovgrad (1946), en Plovdiv (1947), en Jambol (1948), en Sofio (1956). Post 1956 regule ekaperis „Bulgara Esperantisto“.

La E-movado en nia lando fortiĝis en tia grado, ke ĝi helpe de UEA povis organizi du universalajn kongresojn — en Sofio (1963) kaj en Varna (1978), du kongresojn de TEJO (en Vraca kaj Veliko Tarnovo), kongreson de la Internacia Fervojista E-Federacio (IFEFF) en Varna (1968). Dank'al la internaciaj E-arangoj en Bulgario kelkaj miloj da fremdlandaj esperantistoj ricevis eblecon vidi propraokule kiel vivas kaj laboras la bulgara popolo, ĝui la belecon de niaj montoj kaj de la Nigra Maro.

La agado de nia Asocio en la internacia sfero estas konforma al la spirito de la ekstera politiko de nia popoldemokratia ŝtato, t. e. ĝi celas konservon de la paco, interkompreniĝon, kunlaboron kun proksimaj kaj foraj popoloj.

Estante konvinkita pacbatalanto, BEA partoprenis la fondigon de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Dum pluraj jaroj prezidanto de MEM estis Canko Murgin, kaj poste dum 15 jaroj — Nikola Aleksiev, kiu nun estas ĝia honora prezidanto. Nuntempe en Bulgario regule aperas revuo „Paco“ sub la redaktado de Violin Oljanov kaj „Pac-aktivulo“, redaktata de N. Aleksiev.

La bulgara MEM-sekcio sub la gvidado de Dimitar Haĝiev faras viglan porpagan laboron, arangas konferencojn, partoprenis la Parlamenton de la Popoloj en Sofio (1980). Lastjare ĝiaj aktivuloj kolektis pli ol cent mil subskribojn favore al konservo de la paco kaj por senarmigo. La subskribojn oni prezentis al la Unuigintaj Nacioj (Nov-Jorko).

Nun la verda standardo flirtas super la kapoj de kelkaj generacioj. La veteranoj ornamas nian kohorton, transdonas siajn spertojn al la pli junaj generacioj. La generacio, enirinta en la E-movadon post la Dua Mondmilito, estas nun gvida forto en BEA. La plej juna generacio venas en nian movadon kun io nova. Ĝi estas generacio vivĝoja, ŝatas kanti, danci, veturi tra la lando kaj eksterlanden.

Kvankam diversaĝaj, ĉiuj generacioj verve kaj entuziasme laboras por la plua prospero de Esperanto.

Al novaj sukcesoj honore al la 100-jara jubileo de Esperanto!

(Fragmento el la raporto)

SALUTPAROLO DE D-RO RENATO CORSETTI

Vicprezidanto de UEA



Karaj geamikoj,

En la internacia Esperanto-movado la Bulgara Esperantista Asocio kun sia 75-jara historio certe meritas laŭdajn vortojn. Ĉar estas io tre interesa en la bulgara E-movado: oni rajtas aserti, ke ĉiu mistero trakuras Eŭropon, ĉar ĉiuj esperantistoj en Eŭropo kaj en la tuta mondo demandas sin kial en Bulgario estas tiom da esperantistoj, kial en Bulgario la E-movado estas tiel forta? Kaj ĝis nun neniu certe povis kontentige respondi al tiu demando. La homoj fakte ne komprenas kial tio estas en Bulgario kaj ne en Jugoslavio, ne en Francio. Ja estas fortaj movadoj en pluraj landoj, sed la distinga trajto de la bulgara E-movado (laŭ ĝiaj populareco kaj amaseco) estas aparte vigla. Kaj mi kredas, ke unu el la servoj, kiujn la bulgara E-movado povas fari al la naciaj E-movadoj estas — klarigi pri sia sperto ĉe organizado de seminarioj por aktivuloj, aŭ pri la formoj de instruado, pri la reto da kursoj, kiuj estas tre sukcesaj.

Kompreneble, do, ĉiuj estas kontentaj pri vi — ĉiuj esperantistoj eksterlande, sed mi kredas, ke viaj gvidantoj kaj vi ĉiuj, kiuj estas aktivuloj de lokaj E-klubo kaj societoj, ne devas esti kontentaj kaj vi saĝe agas, ke vi ne estas kontentaj. Ĉar vi ja povas atingi ankoraŭ pli multon. La lastaj sukcesoj en la instruado de Esperanto en bulgaraj mezlernejoj estas grava atingajo. Mi ankaŭ aŭdis pri la unuaj seriozaj paŝoj pri uzado de Esperanto dum internaciaj vizitoj en Bulgario kaj tio estas via pruvo pri novaj akiritaj sukcesoj. Ĉi-tie mi vidis plurajn ĝejnulojn, kio estas alia direkto tre interesa: do, pli kaj pli reunigi la E-movadon. Unuvorte, ni estu kontentaj pri la bulgaraj esperantistoj, se bulgaraj esperantistoj estos mal-kontentaj pri si, ĉar tio estos la garantio por pluaj progresoj.

Do, dirinte tion, fakte mi ankaŭ estas tre kontenta esti en Bulgario en la nomo de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, kiu sendis min ĉi-tien por atesti pri la konsidero, kiun UEA havas pri Bulgara Esperantista Asocio, esprimi niajn plej korajn bondezirojn por pluaj sukcesoj lige kun la 75-jara jubileo de BEA.

Mi volas aldoni, ke nin atendas aparte interesa jubilea aranĝo. Vi scias, ke ni eniras periodon, dum kiu post kelkaj jaroj ni festos la centjaran datrevenon de la Esperantista movado mem. En ĉi-tiuj jaroj ĉiutage pluraj landaj E-asocioj festos siajn jubileojn. Ĉi tio estas bona okazo por rigardi la historion de la movado, por eltiri instruojn kaj por rigardi antaŭen al la plua jarcento de Esperanto.

Bonŝance, la pozicio de Esperanto en la mondo havas ĉiam pli helajn perspektivojn. En la lastaj jaroj ni estas pli kaj pli ekster Eŭropo: sufiĉas nur citi la lastajn kaj la venontajn universalajn kongresojn: estis Brazilo, estos Vankuvero, post ankoraŭ du jaroj estos Pekino, poste anonciĝis Aŭstralio. . . Do, tio montras, ke la Esperanto-movado atingas tiun firman bazon, kiu ebligas al ĝi vere atingi gloron dum sia dua jarcento! . .

(Laŭ magnetofona sonbendo — kun mallongigoj)

SALUTPAROLO DE D-RO IMRE PETHES

Prezidanto de MEM



Tre estimataj gekamaradoj,

Karaj geamikoj!

Vizitante vian landon, kun granda kontenteco mi povas konstati vian unuecan kunlaboron por la paco, multflanke uzante kaj aplikante por tiu celo la Internacian Lingvon Esperanto. Viaj faritaĵoj vere pruvas, ke Esperanto estas bonuzebla por la kulturo, por la scienco, por la disvastigo de amikaj kontaktoj inter la homoj kaj la popoloj kaj estas vera rimedo gardi la noblajn tradiciojn! . . .

Karaj ĉeestantoj,

Mi havas la honoron saluti vin en la nomo de hungara esperantistaro okaze de la solenaĵo de 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio kaj transdoni plej varmajn benedizojn pri via estonta laboro.

Ci-jare en nia lando la hungaraj esperantistoj celebris la 100-jaran datrevenon de la granda filo de la bulgara popolo — la elstara pacbatalanto Georgi Dimitrov; morgaŭ en Budapeŝto okazos kunveno, dediĉita al la

jubileo de Bulgara Esperantista Asocio.

S-ro Corsetti bone analizis la fortojn de via asocio kaj mi tute konsentas kun liaj laŭdaj vortoj. Kiel sciante, la 68-a Universala Kongreso de Esperanto okazos venontjare en nia lando kaj mi profitas la okazon kore inviti vin por partopreni ĝin. Nun la hungaraj esperantistoj kun sento de granda respondeco plenumas la taskojn de la preparlaboroj, ĉar en la nuna mondsituacio estas grava afero bone utiligi ĉiun eblecon por ekmovigi antaŭen la interkonatigon kaj amikecon inter ĉiuj homoj.

Tre estimataj geamikoj,

Permesu al mi kiel prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado kun granda estimo danki al vi pro viaj ĝisnunaj pacagadoj kaj esprimi mian konvinkon, ke ankaŭ estonte vi ilin daŭrigos samtiel sukcese! Mi tutkore kaj varme salutas vin okaze de via 75-jara jubileo.

Nia movado bonrezulte plenumas gravajn taskojn. Ci-jare en Antverpeno, dum la Universala E-kongreso okazis la IX Ĝenerala Konferenco de MEM. Ni pritraktis la plej gravajn pactemojn de nia nuntempo samkiel la staton de nia organizo. Ni konstatis, ke novaj militoj minacas la pacon en la mondo, tial estas dezirinde kunigi kaj per tio plifortigi la agadon de ĉiuj pacamantoj.

La centjara jubileo de Esperanto-movado dum la sekvontaj jaroj multe helpos nian agadon.

Pri la bonrezulta laboro de MEM mi ne povus paroli, se mi ne dankus la laŭdindan agemon de la bulgaraj esperantistoj, kiuj ekzemplodone partoprenas en la esperantista pacmovado; kiuj sindone kaj senlace kolektis pli ol centmil subskribojn pri malar-mado, transdonitajn al Unuigintaj Nacioj fare de la bulgara ambasadoro ĉe UN kaj prof. Humphrey Tonkin.

Mi dankas vin pro via eminenta pacagado, kaj mi deziras al la bulgaraj esperantistoj, al la bulgara popolo brilajn sukcesojn, novan kaj novan energion por la estonta laboro kaj bonan sanon kaj prosperon en via vivo!

(Kun mallongigoj)

LA JUBILEAJ TAGOJ EN VELIKO TARNOVO

Se vi promenas laŭ la stratetoj de malnova Tarnovo — la iama ĉefurbo de Bulgario, kies domoj kun tipa arkitekturo pitoreske staras unu super la alia sur la krutegaj rokaj bordoj de rivero Jantra, eble via imago revenigos vin al la komenco de nia jarcento, kiam en la urbo mem kaj en ties distrikto la nova internacia lingvo Esperanto jam havis dekojn da ardaĵ adeptoj. Inter ili viciĝas la nomoj de Nikola Zlatev, Hristo Popov, la verkisto Vasil Drumev, Georgi Aktargiev, d-roj Panajot Hitrov kaj Boris Nedkov, prof. Nikolaj Iribagakov kaj multaj aliaj...

sed tamen ĝi marŝis senŝancelo antaŭen, pli kaj pli disvastiĝis: ĝiajn vicojn eniris miloj da novaj adeptoj. Hodiaŭ la Bulgara Esperantista Asocio estas unu el la plej multmembraj kaj aktivaj landaj E-asocioj, regula kolektiva membro de Universala Esperanto-Asocio.

Kvar fojojn (en 1907, 1923, 1936, 1960) Veliko Tarnovo estiĝis kongresurbo de Bulgara Esperantista Asocio kaj en 1978 en ĝi okazis la kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (TEJO). Ĉio ĉi estas vera rekono pri la kontribuo de la esperantistaro el Veliko Tarnovo al la plua disvastiĝo de Esperanto.



Solena inaŭguro de la jubilea festo

Verŝajne tiu vigla poresperanta agado estis unu el la argumentoj, por ke en 1907 la esperantistoj el diversaj kluboj kaj societoj okazigu en Veliko Tarnovo la Unuan kongreson de tutlanda esperantista organizaĵo nomita Bulgara Esperanto-Ligo (BEL). La kreinto de Esperanto — d-ro Zamenhof, estis elektita ĝia honora prezidanto, kion li danke akceptis. Oficiala organo de BEL fariĝis revuo „Lumo“.

Dum sia 75-jara ekzistado la bulgara esperantista movado travivis multajn malfacilaĵojn, spertis prosperon kaj retiriĝon,

Tute merite je la 25-a—26-a de septembro ĉi-jare la Bulgara Esperantista Asocio okazigis sian jubilean Scienc-Praktikan Konferencon „75 jarojn BEA“ en Veliko Tarnovo — la urbo, kie komenciĝis la organizita disvolvigo de nia E-movado. Tiun ĉi gloran jubileon de BEA partoprenis pli ol ducent E-veteranoj kaj aktivuloj, distingitoj en la kolektado de subskriboj pri malarmado, multaj eminentaj eksterlandaj gastoj.

Iam, antaŭ jarcentoj, en Tarnovo ekzistis fama en la mezepoka mondo literatura skolo — la t. n. Literatura Skolo de Tarnovo,

kiu donis al Bulgario multajn eminentajn literaturistojn, verkistojn kaj klerigantojn.

Nun Veliko Tarnovo estas floranta administrita kaj kultura centro de Bulgario. En ĝi estas mirinde kunligitaj antikveco kaj nuntempo. Sur la maldekstra bordo de Jantra, sur la monteto „Sveta Gora“ — vidalvide de la fama historia monteto „Carevec“, sur kiu situas la impone restarigitaj ruinoj de la palacoj de la iamaj bulgaraj caroj, troviĝas la konstruaĵo de la Ŝtata Universitato „Cirilo kaj Metodij“, kiu dum du tagoj estis rezidejo de la bulgaraj geesperantistoj kaj de iliaj fremdlandaj gastoj, kiuj kunvenis ĉi tie por festi sian 75-jaran jubileon.

Kaj jen venis la solena momento. La aŭlo jam estas plena. Ĉiuj streĉe atendas. Membroj de la prezidantaro kaj gastoj okupis siajn lokojn sur la tribuno.

Guste je la 9-a horo la Scienc-Praktika Konferenco „75 jarojn Bulgara Esperantista Asocio“ estis malfermita per mallonga parolado de **Nikola Aleksiev** — honora membro de UEA kaj de MEM.

Tuj post la parolado de **Nikola Aleksiev** la vicprezidanto de BEA **Nano Kjuĉukov** informis, ke la Ŝtata Soveto de PR Bulgario distingis la Bulgaran Esperantistan Asocion (BEA) per la alta ŝtata ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — III grado, pro ĝia kontribuo por plivastigo de la internaciaj rilatoj de PR Bulgario kaj lige kun ĝia 75-jariĝo kaj tralegis la dekreton. (Plenan tekston de la dekreto legu sur paĝo II).

Sava Dalbokov, unua vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto, solene prezentis la ordenon, persone alkroĉante ĝin sur la asocia standardo. En sia parolado, kiun li faris en Esperanto, li direktis al la ĉeestantoj bondezirojn por plua sukcesa laboro de BEA, emfazante sian partoprenon en la bulgara E-movado antaŭ la Naŭa de Septembro 1944. Li faris koncizan revuon de la agado de BEA kaj atentigis, ke la Bulgara Komunista Partio kaj mem ĝia ĝenerala sekretario **Todor Ĵivkov** kuraĝigas kaj subtenas la agadon de BEA. (La paroladon legu sur paĝoj 1 kaj 2).

Salutparolojn lige kun la 75-jariĝo de BEA faris d-ro **Renato Corsetti** — vicprezidanto de UEA, kaj d-ro **Imre Pethes** — prezidanto de MEM. (La salutparolojn legu sur paĝoj 5 kaj 6). Salutparolis ankaŭ ing. **Vlastimil Kočvara**, — vicprezidanto de la Ĉeĥa Esperantista Asocio, **Mustafa Resulović** — reprezentanto de la Jugoslava Esperanto-Ligo, **Orhan Taneev** — reprezentanto de la Turka Esperantista Asocio,

Josef Vitek — veterano de la Ĉeĥoslovaka E-movado.

Post la salutparoloj **Kunčo Valev** — ĝenerala sekretario de BEA, legis Rezolucion de la partoprenantoj en la konferenco al la ĝenerala sekretario de UN s-ro **Xavier Perez de Cuellar**. La rezolucio enhavis proponon por ĉesigo de la agreso en la Proksima Oriento, por malmarmado kaj paco en la tuta mondo. (La plenan tekston de la rezolucio legu sur paĝo II).

Post la paŭzo **Ĥristo Gorov** — prezidanto de BEA, tralegis sian raporton „75-jara jubileo de la Bulgara Esperantista Asocio“, en kiu li tuŝis la plej gravajn momentojn el la evoluo de la bulgara E-movado. (Fragmentojn de la raporto legu sur paĝoj 3 kaj 4).

Sekvis raportoj de la gastoj el alilando: Doc. **Josif Portnoj**, historiisto kaj sociaganto el Sovet-Unio, parolis pri temo: „La internaciaj ligoj inter laboruloj de Soveta Kazahstano kaj Bulgario en la 20-aj — 30-aj jaroj“. Portnoj ne estas esperantisto, sed dank' al sia konateco kun la eminenta bulgara esperantisto **Nikola Aleksiev** — honora prezidanto de MEM kaj honora membro de UEA, la esperanta temo altiris lian atenton. „La studado de la bulgaraj-sovetaj kontaktoj per Esperanto prezentas gravan politikan intereson“ — li deklaris interalie.

Al **Nikola Aleksiev** docento Portnoj prezentis unikan medalon kun la bildo de Lenin, mane ellaboritan el kirasŝtalo. „Por ke la amikeco estu same tiel longedaŭra kiel la ŝtalo“ — diris Portnoj. Kaj al la prezidanto de BEA **Ĥristo Gorov** li donacis belan pupon en nacia kostumo, akompanante la donacon per la vortoj: „Tiu ĉi pupo nomita Aŭroro nun estas malgranda, sed ŝi kreskos kaj estiĝos esperantistino!“

D-ro **Detlev Blanke**, sekretario de la Centra Laborrondo Esperanto en GDR, prezentis raporton pri temo „Bulgara-germana amikeco pere de Esperanto“, **ĉuad Tvarčák**, vicprezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, parolis pri „Esperantistaj kontaktoj inter Slovakio kaj Bulgario“.

La konferencon salutis ankaŭ s-ro **R. H. Hegen**, reprezentanto de la MEM-sekcio en FRG, kaj s-ino **Aŭgustino Bois** el Francio.

Post la tagmeza paŭzo sekvis raportoj de bulgaraj esperantistoj, kiuj havis karakteron de sciencaj esploroj pri la historio de la Bulgara E-movado. Jen estas listo de la raportoj kaj de la raportintoj — laŭ la ordo, en kiu ili parolis: **Canko Murgin** — „Amasigo kaj organizado de la bulgara esperantista mo-

vado (1899 — 1907); Violin Oljanov — „La laborista Esperanto-movado en Varna; Krestju Sofroniev — „Fondo kaj agado de Esperanto-klubo „Stelo“ en Plovdiv (1900—1904); Olga Cankova — „La kontribuo de la esperantistaro en Veliko Tarnovo por la fondo de Bulgara Esperantista Asocio“; Canko Igeev — „Esperanto kaj la laborista klaso“; prof. Kiril Popov — „20 jarojn Medicinista E-sekcio ĉe BEA“; Petko Arnaudov — „Karakterizaj trajtoj de la E-movado en distrikto Pazarĝik“; Ivan Slavov — „El la historio de la E-movado en Ruse; Nikola Uzunov — „El la historio de la E-movado en Ĥaskovo; Nikola Aleksiev — „Sofio — ĉefa centro de la laborista E-movado“; Bojana Prodanova — „El la historio de la E-movado en distrikto Gabrovo“; Simeon Hesapĉiev — „Pri kelkaj momentoj el la E-movado en Bulgario“.

Ĉiuj raportoj estis tre interesaj — en ili estis prezentitaj gravaj momentoj kaj faktoj el la historio de la bulgara E-movado kiel tuto kaj el la historio de la lokaj societoj.

Konkludan raporton pri temo „BEA — aktiva batalanto por paco, internacia kom-

preniĝo kaj socia progreso“ faris **Dimitar Papazov**, sekretario de BEA.

Oni informis, ke ĉiuj raportoj aperos en aparta libro.

Per tio la tagordo de la konferenco elĉerpigis. Ferman paroladon faris **Hristo Gorov**, prezidanto de BEA. En sia nomo kaj en la nomo de ĉiuj bulgaraj esperantistoj li dankis al la bulgara registaro pro la alta distingo — la ordeno „Popola Respubliko Bulgario“, per kiu estis honorita la Bulgara Esperantista Asocio kaj al ĉiuj oficialaj personoj, kiuj honoris per sia ĉeesto la konferencon.

Sian dankon li esprimis ankaŭ al la alilandaj gastoj, al la bulgaraj E-veteranoj, al la loka organiza komitato kaj al ĉiuj ĉeestantoj.

Adiaŭante la gastaman urbon Veliko Tarnovo — lulilon de la bulgara esperantista movado, li bondeziris al ĉiuj sanon, prosperon kaj estontajn sukcesojn en ilia poresperanta agado.

Veliko Tarnovo — Sofio, septembro 1982

Lidia RAEVA



Partoprenantoj en la jubilea festo de BEA en Veliko Tarnovo

Dum la Scienc-Praktika Konferenco „75 jarojn BEA“ oni prezentis tre interesajn raportojn kaj sciencajn sciigojn. Ili estas frukto de historiaj esploroj kaj serĉadoj dum pluraj jaroj. Sed dum la scienca valoro de tiu ĉi forumo de la bulgara E-movado estis taksita en plena grado precipe de la partoprenintoj en ĝi, la kulturaj iniciatoj altiris la intereson ankaŭ de la neesperantista publiko en la distrikto de Veliko Tarnovo.

EKSPOZICIO DE KOLEKTANTOJ

Jam antaŭ la oficiala inaŭguro en la salono de la Centra Poŝtejo en Veliko Tarnovo, kie estis aranĝita la ekspozicio de la lokaj esperantistoj-kolektantoj — Ĥristo Dolĉinkov kaj Zdravko Nikolov, multaj vizitantoj, inter kiuj ankaŭ neesperantistoj, amasiĝis ĉe la enirejo.

Preskaŭ dudek jarojn Ĥristo Dolĉinkov, instruisto de Esperanto, dediĉas sian liberan tempon al unu malofta hobia¹. Per siaj korespondantoj kaj dum siaj veturoj en eksterlando li kolektas kolorajn bildkartojn pri temo „Naciaj kostumoj“. En la momento lia kolekto nombras ĉirkaŭ 1000 bildkartojn el 30 landoj. La kolektanto plej alte taksas la bildkartojn, rakontantajn pri la vivmaniero kaj kutimoj de la nordamerikaj indianoj kaj de la maorioj — la indiĝenaj loĝantoj de Nov-Zelando. Variaj estas ankaŭ la kolektoj el Hungario, Svedio, Nederlando, Hindio. Tre originalaj estas la bildkartoj el Sri Lanka (Cejlono) kaj la Kanariaj Insuloj.

La alia pasio de Ĥristo Dolĉinkov estas kolektado de lernolibroj de Esperanto. Li jam posedas 150 tiajn lernolibrojn, inter ili ankaŭ el Ĉinio, kun dediĉo de la aŭtoro.

Zdravko Nikolov estas fotisto. En 1960 li ligas sian hobion — la filatelon, kun la Internacia Lingvo. Depost tiam Zdravko Nikolov kolektas poŝtmarkojn, kovertojn kaj stampojn pri temo Esperanto. En lia kolekto estas kelkaj fakoj: „D-ro L. L. Zamenhof — aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto; Internaciaj kongresoj; SAT-kongresoj; IFEF-kongresoj; Internaciaj aranĝoj; Naciaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj; Jubileoj; Propagandaj materialoj pri Esperanto; Ofica poŝto“.

Inter la unikaĵoj en lia ekspozicio la vizitantoj havis eblecon vidi koverton kun varsovia stampo de la 26-a de marto 1904. Sur la ko-

verto la mano de Zamenhof estas skribinta la adreson de la esperantisto el Veliko Tarnovo Ivan Nenkov. Historian valorajn prezentas poŝtkarto, sendita de la internacia E-kongreso, okazinta en 1907 en Kembrigo. Ĝi estas foto de la kongresa laborprezidantaro, en la centro estas Zamenhof. En la kolekto estas konservata ankaŭ poŝtkarto el la internacia Esperanto-kongreso en Dreseno en 1908.

Per poŝtkartoj Zdravko Nikolov eksciis la lokojn en la mondo, kie estas konstruitaj monumentoj de la eminenta aganto de la tutmonda komunista kaj laborista movado Georgi Dimitrov.



La prezidanto de BEA Ĥr. Gorov inaŭguras la ekspozicion

Per la kolektanto plej valcraj estas la poŝtendaĵoj, kiuj jam veturis, t. e. ili plenumis sian destinton kaj en kiuj kunigas la tri elementoj de la E-temo — bildkarto aŭ koverto, poŝtmarko kaj stampo (el la loko, kie okazis E-aranĝo).

Krom estetikajn plezuron, kion ankoraŭ donas la kolektado al ambaŭ esperantistoj?

Ĥristo Dolĉinkov: „Mi konatiĝas kun la vivmaniero, moroj, kutimoj de la aliaj popoloj, eĉ mi pliriĉigas miajn konojn pri geografio“.

Zdravko Nikolov: „Samkiel Ĥristo — krom riĉigo per geografiaj konoj, mi „satigas“ ankaŭ mian filatelan „malsaton“ kaj kio estas plej grava — mi informigas konstante pri novaj kaj novaj faktoj el la historio de la bulgara kaj de la monda Esperanto-movado.“

¹ Hobio — ŝatokupo

La solena koncerto, dediĉita al la 75-jara jubileo de BEA okazis en la Domo de Popola Armeo — Veliko Tarnovo.

Ĝi komenciĝis per la versaĵo „Al la 75-jara BEA“ de Dimitar Denĉev en plenumo de Jorjeta Zdraveva kaj de la artisto Jordan Duĥnev el la teatro en Veliko Tarnovo.

„Septembran baladon“ de Hristo Gorov emociis prezentis Angelina Sotirova — aktoro-pedagogo en la Supera Instituto pri Teatra Arto „Krestju Sarafov“ — Sofio.

Inter la recitantoj per siaj interpretoj distingis Antoaneta Panova, laureatino de la Internacia Konkurso de Botev-Poezio („Sankta mia bulgara tero“ — eseo de Stefan Prodev) kaj la aktoro Mihail Zdravev („Pripensu, sinjoro senatoro“ — versoj de Manfred Arnold, „La dokistoj deklaras“ de Ljudmil Stojanov kaj „Bravuloj“ — satira miniaturo de Mass kaj Cervinski).

La mildajn, virinece varmajn versojn „Pri la feliĉo“ de la E-poetino Ljuba Bojagieva prezentis la laureatino de la Internacia Konkurso pri Botev-Poezio Jorjeta Zdraveva.

Dinjo Dinev — artisto solisto el la oper-teatro en Plovdiv bonege interpretis „Lulkanton“ de Schubert, „Najtingaloj, najtingaloj“ de Solovjov-Sedov kaj „Mlad delija“ de Georgi Spasov. Karamfilka Adamova, la mova Adamova plenumis „Kial vi turmentas min, Jano“ — muziko de Prokopova, „Ario de Mjuzeto“ el la opero „Boĥemoj“ de Puccini kaj „He, Stojane“ de Paraŝkev Haĝiev. Dimitar Denĉev sin prezentis per „Ho, mia kor“ — teksto de Zamenhof, per „Ario de Nadir“ el la opero „Casistoj de perloj“ de Bizet kaj „Itala barkarolo“, muziko de Forresi. La juna kantistino Radka Malamova plenumis „Biljana tolon blankigis“ de Panĉo Vladigerov, „La najtingalo“ de Sein-Saens kaj „Gardu min“ laŭ originale verkita en Esperanto teksto de Penka Batoeva kaj muziko de nia samideano el Ĉeĥoslovakio, la komponisto Lubomir Huf.

Duan fojon post la ĉi-jara Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Plevne oni renkontiĝis kun la arto de la juna komponisto Milen Makedonski. Li dediĉis al la jubileo du siajn komponaĵojn por piano — „Emocioj“ kaj „Du solecajn koroj“, verkita per junula sentemo kaj lirikeco.

Dum la dua parto de la koncerto la publiko estis kaptita de la magio de l'bulgara folkloro. Belstaturaj junulinoj en ĉarmaj naciaj kostumoj kaj sveltaĵoj el la folkloro ensemblo „Sider vojvoda“ el urbo Gorna Orjahovica per graciaj dancoj kaj belaj kantoj prezentis la originalan popularon de sia regiono. La programo „Mizio¹ kantas kaj dancas“, plenumita de la 65 kantistinoj, instrumentistoj kaj dancistoj inkluzivis: „Mizia

suito“ — kun la partopreno de la ĥoro, orkestro kaj dancensemblo; „Virina ŝopa² danco“; Rita danco „Rusanci“ kaj „Nordlanda suito“. La surprizita publiko renkontis emociis la popolkantojn plenumitajn en Esperanto: „Fumo fumis“, „Penka sur verando sidis“, „Kunvenis, kunvenis“ kaj „Kanto pri Rusio“.

Dum nia konversacio kun Nikola Obreŝkov — artgvidanto de la ensemblo, evidentiĝis ke la intereso de la plenumantoj al Esperanto daŭras jam tri jarojn. Dum unu jaro ili lernis la Internacian Lingvon. Kaj la koncerto honore al la 75-jariĝo de BEA estas ankoraŭ unu elprovo por la tuta ensemblo antaŭ la turneo en Italio, kie ĝi gastos per Esperanto.

La plenumantinoj de popolaj kantoj finis sian programon per la esperanta himno „La Espero“ de Zamenhof. Kortuŝite, la ĉeestantoj — veteranoj, aktivuloj, junaj adeptoj de E-movado, starigis kaj ekkantis kune kun la kantistinoj „En la mondon venis nova sento...“

HONORE AL LA E-PIONIRO HRISTO POPOV

La 26-an de septembro la partoprenantoj en la konferenco, la gastoj kaj multaj civitanoj kunvenis antaŭ la naskiĝdomo de Hristo Popov en urbo Dolna Orjahovica por ĉeesti la solecan inaŭguron de memortabulo honore al la pioniro de la bulgara E-movado.

En sia parolo la urbestro Dimo Statev konigis al la ĉeestantoj la historion kaj la estantecon de Dolna Orjahovica, parolis pri la apostola laboro de Hristo Popov kiel popola instruisto, esperantisto kaj aktivulo de la loka legosocieto. En 1907 Hristo Popov donas sian kontribuon por la fono de BEA. Kune kun Georgi Oreŝkov li aperigas la lernolibron „Manokonduko“ — plena gvidilo por lernado de la Internacia Lingvo Esperanto (1900).

Estis fondita muzea kolekto en unu el la ĉambroj de lia domo, prizorgata de Maria Popova-Kirĉeva — la plej juna filino de Hristo Popov kaj sola viva membro de la familio. La muzea kolekto rakontas al la vizitantoj pri la variaj intereso de la esperantisto. Inter la loka loĝantaro li ĝuis la famon de aŭtodidakta popola kuracisto, kolektanto de mineraloj, amatora ĝardenisto, tradukis librojn el rusa kaj franca lingvoj, interesiĝis pri historio, estis aŭtoro de beletraĵoj, poeziaj kaj humuraj verkoj. Laŭ la lastaj historiaj esploroj antaŭ ol dediĉi sin al Esperanto, li estis volapukisto. Multaj ĉeestantoj enskribis siajn impresojn pri la muzea kolekto en la memolibron.

Post mallonga parolado pri la vivo kaj agado de Hristo Popov, la prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov inaŭguris la memortabulon sur la domo.

¹ Mizio — regiono en Norda Bulgario

² Ŝopoj — etna grupo en Sofia regiono

Rimarkinda evento en la vivo de Polski Trambes estis la Vespero de Paco, organizita la 24-an de septembro ĉi-jare. La urbon vizitis gastoj-geesperantistoj el diversaj landoj.

Alveninte pli frue, la prezidanto de MEM — d-ro Imre Péthes havis eblecon viziti la najbaran vilaĝon Pavel, doninta karajn viktimojn en la kontraŭfaŝisma batalo.

Jam vesperiĝis, kiam en la Domon de la Agrar-Industria Kooperativo venis novaj gastoj: k-doj Hristo Gorov, Nikola Aleksiev, Kunčo Valev, Dimitar Haĝiev k. a. el Sofio kaj el aliaj loĝlokoj, reprezentantoj de la E-movado el USSR, GDR, FRG, Hungario, Hispanio, Turkio kaj Jugoslavio.

Dum la okazinta renkontiĝo kun la urba estraro, la vicprezidanto de la Komunuma Popolkonsilantaro Koljo Markov informis la gastojn pri la atingoj de la urbo en la ekonomia kaj kultura kampo. En la nomo de la gastoj respondis d-ro Detlev Blanke (GDR), kaj k-doj Aleksiev kaj Péthes metis florkronon antaŭ la monumento de la mortigitaj lokaj kontraŭfaŝistoj.

paŝis kun vigla esperantista kanto, flirtigante verdajn flagetojn, 50 junpioniroj-geesperantistoj. La gastojn entuziasme salutis la lernantino Rozalina Galunova. Sur la koloj de la prezidantoj ekbrilis ruĝaj junpioniraj tukoj, en ĉies manoj aperis bonodoraj floroj.

Per patosaj vortoj d-ro Péthes priskribis la danĝeran situacion en la mondo, kaŭzitan de la militarismaj ambicioj de Reagan kaj NATO. Li parolis pri la cionista teroro kaj agreso en Libano, kuraĝigata de Usono. Samtempe d-ro Péthes memorigis, ke la popolamasoj en Eŭropo kaj alilande pli kaj pli profunde konscias la danĝeron, kiu minacas ilin pro la frenezaj planoj de la imperiismo kaj ĉiam pli kuraĝe aliĝas al la porpacaj demonstracioj.

Li parolis ankaŭ pri la pacdefenda aktivado de la monda esperantistaro, pri la celoj de MEM, alvokante la ĉeestantajn geurbanojn ankoraŭ pli amase lerni la lingvon de la paco kaj interkompreniĝo.

Post li parolis kamarado Josif Portnoj, scienca sekretario de la Konsilantaro pri Sociaj Sciencoj ĉe la Politeknika Instituto en Karaganda, USSR. „Ĉies devo estas — li diris — helpi la konsolidiĝon de la unueca porpaca fronto. Tiel konsilis siatempe Georgi Dimitrov, kies 100-jaran jubileon nun festas la tuta progresema mondo. Lia alvoko ankaŭ nun estas aktuala.“

K-doj Péthes kaj Aleksiev disdonis premiojn al apartaj geesperantistoj kaj E-societoj el la lando, kiuj kolektis plej multe da subskriboj lige kun la alvoko pri malarimado. Kun aplaŭdoj estis renkontita la sciigo, ke en la distrikto de Razgrad estas kolektitaj 33 mil subskriboj kaj en Sofio nur k-dino Nadejda Ciplakova kolektis 16000 subskribojn. Anoncitaj estis ankoraŭ multaj ekzemploj pri modela plenumo de la porpaca esperantista devo.

En la nomo de la ĉeestantoj Krestinka Dimitrova proponis telegramon al la Ĝenerala sekretario de la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu estis akceptita unuanime.

La kunvenon kronis la riĉenhava arta programo de la folkloro Ensemblo „Sider Vojvoda“ el Gorna Orjaĥovica sub la gvidado de Nikola Obreŝkov.

Hristo VOLIN



La honoraj gastoj de la porpaca vespero

La Vespero de Paco estis kulmino de la ĉi-tagaj aranĝoj. La salono de la Kulturdomo estis plen-plena je vizitantoj, kiuj renkontis la gastojn per ŝtormaj aplaŭdoj. Lokon en la prezidio prenis ĉiuj eksterlandaj gastoj, k-doj Aleksiev, Gorov, Haĝiev kaj lokaj E-aktivuloj kaj gvidantoj. Anoncante, ke la iniciato apartenas al la Komunuma Porpaca Komitato kaj al Esperantista societo „Hristo Kozlev“, la prezidanto de la porpaca komitato Ivan Bonev prezentis la gastojn kaj malfermis la kunvenon. Sur la scenejo al-

Pasas jaroj . . . Pasis pli ol sepdek kvin,
kiam en la nokt' ekbrilis la lumeto,
kiam sola kaj unua al la pinto
de la nuna temp' ekmarŝis la profeto.

Kaj ekflirtis alte lia verda flago
idealon ĝi estigis en la korojn,
komenciĝis venka apostola ago,
kreskis la movado, kreskis ĝia gloro.

Venis en la vicojn bravaj laboristoj,
viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj . . .
Jen en marŝ' armeo da esperantistoj
impetantaj al revata cel' komuna.

Iam estis nia marŝ' batalo sanga,
kiu komenciĝis de l'lerneja benko . . .
Falis la herooj kaj martiroj sanktaj . . .
Ne donace venis nia glora venko!

Iam Miloslav¹ flamigis la lumeton,
forta fajro nun ŝprucigas fortan helon.
Ne forgesu ni la voĉon de l'profeto,
por ke brilu sur la ter' la verda stelo.

Plej subluma estas nia idealo,
idealo de la esperantistaro.
Marŝu firme ni antaŭen en batalo,
por ke en kompreno vivu la homaro.

1982

Dimitar DENČEV

¹ Miloslav S. Bogdanov, aŭtoro de la unua E-lerno-libro por bulgaroj.

GRAVA REKONO PRI NIA PORPACA AGADO

Al Bulgara Esperantista Asocio

Karaj gesamideanoj,

Ni, en Kvakera Esperantista Societo, ricevis kun granda ĝojo la novaĵon de Humphrey Tonkin pri la Malarmada Petskribo, prezentita de la bulgaroj al la Dua Speciala Sesio de UN pri Malarmado.

Kiam ni metis en la gazeton „Esperanto“ la anoncon kun la petskribo, ni konstatis, ke ĝi estas sufiĉe eduke valora pro la ebleco esperantistoj legu ĝin. Kompreneble, ni esperis, ke multaj respondus, sendante petskribon kun kelkaj subskriboj. Tamen se iu estus dirinta, ke cent mil personoj en Bulgario respondos per subskribo pere de la bulgaraj esperantistoj, ni eble ne estus kredintaj pri tio. Nun ĝi realiĝis kaj ni multe dankas al vi ĉiuj, kiuj sendube multe laboris por atingi tiun mirindan rezulton.

La rikolto de tiu ĉi agado estis jam kelkflanka. Unue, ĝi kuraĝigis nin en KES pri nia pacagado. Due, ĝi allogis la helpon de JEA pro la prezentado al la Speciala Sesio, ĉar ĝi montris, ke Esperanto estas praktikaĵo, kiu gajnas rezultojn. Trie, ĝi donis al ni, KES, okazon en la jarkunveno de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) en Britujo anonci la novaĵon, kiu impresis la neesperantistojn pro tio, ke Esperanto povus esti uzata kun efiko por paclaboro, pri kiu kvakeroj ĉiam fervoras. Pro tio ni esperas, ke pli da kvakeroj iĝos esperantistoj aŭ almenaŭ subtenantoj.

Tre varme mi salutas vin en la nomo de KES.

Amike via
BRIAN PHILLIPS,
Prezidanto de Kvakera
Esperantista Societo

LA GAZETARA KONFERENCO

La 24-an de septembro posttagmeze en la junulara klubo „Orbita“ okazis gazetara konferenco lige kun la 75-jara jubileo de BEA. Ĉeestis reprezentantoj de la centraj gazetoj „Rabotničesko Delo“, organo de CK de BKP, „Otečestven Front“, „Zemedeľsko Zname“, „Trud“, „Eho“, de la Bulgara Telegrafa Agentejo (BTA), de la Bulgara Televido kaj Radio Sofio, de la distrikta gazeto „Borba“ en Veliko Tarnovo, de la distrikta Televido kaj Radio-centroj, gazeto „Ustrem“ en urbo Gorna Orhaŭovica kaj ankaŭ reprezentantoj de la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo kaj aliaj kunlaborantoj de la gazetaro.

La konferencon malfermis la ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ Dončo Hristov — gvidanto de la Gazetara Servo, kiu bonvenigis la ĵurnalistojn kaj prezentis al ili la prezidanton de Bulgara Esperantista Asocio Hristo Gorov, la sekretario de BEA Dimitar Papazov, la prezidantino de la urba E-societo „Lumo“ Maria Pejкова kaj la veteranon de la bulgara E-movado Boris Kavalĝiev el Ruse.

En sia parolo k-do Hristo Gorov koncize konigis al la partoprenantoj la 75-jaran historion de la bulgara E-movado, substrekte, ke ĝiaj aktivuloj estis ankaŭ elstaraj batalantoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo en nia lando, ke nun la bulgaraj esperantistoj ĝuas la apogon kaj la estimon de la Bulgara Komunista Partio kaj la bulgara Registaro pro sia nobla kultur-kleriga agado kaj pro sia aktiva partopreno en la pacbatalo.

Pri la aranĝoj de la jubilea programo detale informis k-do Dimitar Papazov.

La partoprenantoj montris viglan intereson kaj starigis al la parolintoj multajn demandojn pri la jubileo, pri la perspektivoj de disvolviĝo de la E-movado, pri la laboro kun la ĝejunuloj, pri niaj internaciaj rilatoj.

Ĝojiga estas la fakto, ke pri nia jubileo en Veliko Tarnovo informis la centraj kaj lokaj amaskomunikiloj. La Bulgara Televido preparas specialan dokumentan filmon pri la bulgara esperantista movado.

Ni kore dankas al niaj gekolegoj, kiuj per siaj informoj pri la 75-jara jubileo de BEA denove subtenis la aproban rilaton al nia E-agado.

D. S. H.

REEĜOJ PRI NIA JUBILEO

„Al mi grandan impreson faris la enhavriĉaj raportoj de Hristo Gorov, d-ro Imre P. thes, Nikola Aleksiev, d-ro Detlev Blanke kaj E. Tvarček. Mi kredas, ke rezulto de la konferenco estos plena progreso de la E-movado en Bulgario, stabiĝos la internaciaj ligoj kun progresemaj E-organizaĵoj el eksterlando.“

Mi sincere dankas la Centran Estraron de Bulgara Esperantista Asocio pro la altnivele organizita konferenco, pro la disponigita eblico fari raporton pri la internaciaj kontaktoj de laboruloj el Soveta Kazahio kaj Bulgario dum la 20–30-aj jaroj ĝis la hodiaŭa tempo.“

JOS'F PORTNOJ,
docento, kandidato de historiaj
sciencoj — Karaganda, USSR

„La Scienc Praktika Konferenco havis altan ideologian kaj sciencan valoron. Laŭ mia opinio oni tre bone sukcesis montri la politikan fundamenton, kiu fontas el la revoluciaj tradicioj de la laborista movado. Dum la konferenco amasiĝis valora materialo, kiu estas grava kontribuo ne nur al la historio de BEA, sed ankaŭ al la historio de la tutmonda esperantista kaj laborista movado.“

Nia E-asocio tre serioze pritraktos vian sperton.“

D-ro DETLEV BLANKE,
Sekretario de E-Asocio de GDR

„Mi kun admiro konstatis la enviindan fakton, ke multaj el tiuj, kiuj fondis BEA aŭ helpis al ĝi kreski kaj fortiĝi en la unuaj ekzistojaroj, ankoraŭ aktive partoprenas en la asocia agado. Tio donas kontinuecon kaj forton al la laboro de BEA kaj helpas atingi rezultojn, kiuj ne restas sen rekono eĉ ĉe la plej altaj partiaj kaj ŝtataj instancoj.“

Tiu ĉi helpo kaj subteno klare montras, kiagrade en Bulgario la esperantistoj per sia laboro fariĝis nedisigebla parto de la publika vivo. Ĉi-rilate la veteranoj de la E-movado havas grandan meriton kiel modelo por la junularo.

EDUARD V. TVAROŽEK,
ĈSSR

„Krom la bone organizita konferenco ankaŭ impresis min la varia koncerto kun altnivelaj plenumoj en Esperanto.“

Lige kun tio mi opinias, ke ege necesas la kultura interŝanĝo por pli bona interkompreniĝo kaj paca kunvivado de la du sociopolitikaj sistemoj. Esperanto sukcese servas al tiu celo kiel lingva komunikilo.“

ROLAND H. HEGEN,
FRG



Grupo el 12 personoj de la ĉambra konsisto de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, sub la gvidado de la Ĥorestro Dimitro Terziev, vizitis la 67-an Kongreson de Esperanto, kiu okazis de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1982 en Antverpeno, Belgio.

La 29-an de julio dum la „Muzika vespero“ de la kongresa programo, kvankam en malgranda konsisto — 4 sopranoj, 4 aldoj, 2 tenoroj kaj 2 basoj, la Ĥoro prezentis sin tre bone, plenuminte en Esperanto belsonajn bulgarajn kantojn kaj rikoltis la ŝtormajn aplaŭdojn de la ĉirkaŭ 2000-persona publiko.

Dum la 65-a Kongreso en Stokholmo 1980, laŭ iniciato de Dimitro Terziev, estis organizita Inter-

nacia Esperanto-Ĥoro. Li subtenis konstantan kon takton per leteroj kun la Ĥoristoj. Granda parto el ili vizitis Antverpenon. Krom ili, al la Ĥoro aliĝis ankoraŭ granda parto da aliaj dezirantoj kaj tiel la Ĥoro kreskis je 50 personoj el 16 naciecoj. La bulgara konsisto estigis kernon de tiu jam duan fojon organizita Internacia E-Ĥoro sub la gvidado de la entuziasma kaj senlaca Ĥorestro Terziev. Dum la kongresa tempo okazis ĉiutage po 2, eĉ jam po 3-foje ekzercoj, antaŭ- kaj posttagmeze.

Laŭ programo la Ĥoro prezentis sin antaŭ la publiko dum la „Muzika paŭzo“ de la lasta ferma kunsido de la kongreso. Kun granda sukceso kaj entuziasmaj tondraj aplaŭdoj, la Ĥoro plenumis 2 kantojn: „Tiun ĉi vesperon“ — flandra popolokanto kaj „Ekflugu nia Esperanto-kant“ — teksto kaj muziko de la Ĥorestro D. Terziev. Akompanis per akordiono John Brownly — Ĥorestro de la Londona E-Ĥoro, ankaŭ partopreninta la kongresan programon. Poste, dum la fermo de la kongreso mem, la Ĥoro plenumis ankoraŭ 2 kantojn: „Hej vent!“ — latva popolokanto kaj „La himno de Esperanto.“ Kiam la Ĥoro komencis kanti la himnon, la tuta entuziasmiginta kongresanaro ekstaris kaj kune kun la Ĥoro ekkantis. Tiutempe la Ĥorestro turnis sin al la publiko, gvidante kiel la Ĥoron, tiel ankaŭ la publikon mem.

La Ĥoro prezentis sin tiel brile, ke eĉ la prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens kun plej kora brakumo kaj kiso gratulis la Ĥorestro Terziev.

Pro sia alta majstreco, la ĉambra Ĥoro de Sofiaj esperantistoj estis invitita viziti iujn landojn en Eŭropo por plenumi memstarajn koncertojn.

Fine, adiaŭinte unu la alian, la Ĥoristoj de la Internacia E-Ĥoro bondeziris al si sukcesan aĝrablan renkontigon venontjare ankaŭ en la 68-a kongreso en Budapeŝto.

Stefka AKMANOVA

LA HISTORIA MUZEO DE ZLATARSKI

La 24-an de julio j. k. grupo da esperantistoj el societo „Albato“ — Varna, vizitis la E-veteranon Dimitar Zlatarski en vilaĝo Dalgopol (Varna-distrikto).

Senpacience ni atendis tiun renkonton. Ni multon estis aŭdintaj pri la merita instruisto kaj popola kulturaganto Zlatarski, pri lia E-agado kaj pri la muzeo, fondita de li.

En sia libro „Lando, abunde kovrita de historio“ la verkisto Serafim Severnjak dediĉas al li kelkajn admirplenajn paĝojn. Li sciigas, ke pri tiu rimarkinda homo oni skribis en la bulgara, kaj ankaŭ en la sovetaj gazetoj — en „Izvestija“ kaj en „Soveta Arkeologio“. En la lasta gazeto lia agado estas nomita „la kulturo de Zlatarski“. La esprimo estas tute ekzakta.

D. Zlatarski estas esperantisto depost 1919. Esperanto vekis ĉe li intereson al diversaj fakoj kaj branĉoj de la scienco. Li ekinteresiĝis pri natursciencoj, historio, stenografio, folkloro, tradukis bulgarajn versaĵojn en Esperanton kaj kreis originalajn poeziaĵojn, kiujn li publikigis sub la pseŭdonimo Miti. Ĉio ĉi konservis lin spirite juna, estigis lin homo eksterordinare erudita kaj kun granda ĉarmo.

La veterano Zlatarski montris al ni sian historian kolekton kaj rakontis pri lia laboro sur la nobla kampo de la historio.

Heredinte de sia patro malgrandan kolekton de arkeologiaj trovaĵoj, li pliampleksigis ĝin. En tiu

agado lin helpis lernantoj, junuloj, instruistoj. En 1952 ili aranĝis en malnova domo la unuan muzean ekspozicion, kaj en 1965 translokiĝis ĝin en la urban kulturdomon, kie ĝi troviĝas nun.

La muzeo de Zlatarski ne estas ordinara regiona muzeo. La kolekto entenas valorajn ekspoziciajn ekde la ŝtona epoko ĝis la tempo de la slavoj — arĝilajn ujojn, laborilojn, monerojn, idolojn ktp. dokumentojn kaj objektojn de la revolucia pasinteco de tiu regiono. Aparte interesaj estas la tabuloj kun fotoj pri la vivmaniero kaj folkloro de la regiono. Bedaŭrinde ni ne vidis kelkajn ekspoziciajn, kiujn oni prenis por ekspozicio de la traca arto en Okcidenta Eŭropo, aŭ por restarigo en Sofio. Sed ankaŭ tio, kion ni vidis, igis nin fieraj, ke ni loĝas en regiono kaj lando kun tiom riĉa miljara historio. Ni estas fieraj ankaŭ pro tio, ke tiun kolekton aranĝis esperantisto.

Estigis amika kaj hejmeca atmosfero. Oni ne sentis la diferencon inter la generacioj. Unuigis nin Esperanto kaj la intereso pri nia pasinteco.

Ni starigis al Dimitar Zlatarski multajn demandojn. Li volonte respondis al ĉiuj. Fine li invitis nin veni venontjare, kiam la ekspozicio estos translokiĝinta en la novan domon, konstruitan speciale por ĝi.

VIZITINTO

La 27-an de septembro 1982 en la Domo de Kulturo en Gabrovo, okazis amika renkontigo inter la eksterlandaj gastoj de la Scienc-Praktika Konferenco „75 jarojn de BEA“ kaj gabrovaj geesperantistoj.

Gasto de la renkontigo estis la vic-prezidanto de la Distrikta Soveto por Popola Klerigo, la merita instruisto Ivan Tinčev.

La prezidanto de DE de BEA Nikola Poparov salutis la eksterlandajn gastojn kaj parolis pri la E-agado en la distrikto.

La lernantinoj premiitaj dum la Internacia

konkurso pri Botev-poezio deklamis versaĵojn de Hristo Botev. Oni rakontis gabrovajn anekdotojn.

Kamarado Nikola Aleksiev informis la esperantistojn el Gabrovo pri la laboro de la konferenco en Veliko Tarnovo.

La eksterlandaj gastoj esprimis siajn impresojn pri nia lando kaj pri la bulgara gastamo kaj sian deziron vivi en paco.

Al la gastoj oni donacis memoraĵojn.

Sonja TIHOVA

EN BANKJA — FESTO EN STRATO „ESPERANTO“



Momento el la festeno

La strato nomiĝas „Esperanto“. Tiun nomon ĝi ricevis en 1959 omaĝe al la 100-jara datreveno de Zamenhof. La strato estas en la centro de Bankja. La ĉiujara festo de la loĝantoj de strato „Esperanto“ estas jam tradicia.

Bankja situas inter la pitoreskaj altaĵoj de Ljulin-monto, riĉa je abunda verdaĵo, mineralaj akvofontoj kaj pura aero. La urbeto estas nomata „oksigena puto“. Nun Bankja estas konata nacia kaj internacia ripozloko. Ĉiujare ĉ. 200 000 ripozantoj el Bulgario kaj el eksterlando vizitas ĝin por plibonigi sian sanstaton. Kiel ripozloko por nefumantoj kaj abstinentuloj, en kiu ne estas fabrikaj kamentuboj. Bankja estas kombino el civilizacio kaj naturo — sava modelo de loĝloko en nia nuntempo. Aktivaj kulturaj institucioj ĉi-tie estas: legejo „Otec Paisij“ kun granda biblioteko kaj amatora artagado, literatura rondo „I. Vazov“, la E-societo, fondita en 1936.

Organizantoj de la kvina laŭvica „Festo de nia strato“ estis la sociagantoj Emil Gospodinov, Zlatko Gerovski, Boris Popov, la sekretario de la E-societo

Boris Atanasov, la legeja aganto Lozan Lozanov, la verkisto Ivan Kolarov. Ĝi koincidis kun la malfermo de la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno (Belgio) — la 24-an de julio.

Sabate posttagmeze en la suna strato „Esperanto“ en la ĉeesto de pli ol 300 personoj eksonis laŭtparolilo, kaj poste — ekmuzikis folkloro orkestro. Ekvenadis feste vestitaj virinoj, viroj, infanoj, iuj en regionaj popolstilaj vestaĵoj. Baldaŭ poste la tabloj, metitaj sur la straton mem pleniĝis de floroj, pano, manĝaĵoj, tavolokukoj, dolĉaĵoj, trinkaĵoj. Sur la trotuaroj ĉirkaŭe haltadis preterpasantoj aŭ loĝantoj el aliaj stratoj. Inter la gastoj estis la sekretario de la Distrikta Komitato de BKP Dimitar Angelov, la vicprezidanto de la Distrikta Popola Konsilantaro ing. Emil Konstantinov, la vicprezidanto de la Urba Estraro de BEA en Sofio Ĥaim Levi, grupeto da esperantistoj el Lejpcigo (GDR).

Alternis salutparoloj. La partoprenintoj en la E-kurso ricevis diplomojn. Membroj de la literatura rondo laŭtlevis siajn verkojn. La humoristoj el Bankja plenumis distran programon. Kaj denove — kantoj kaj popoldancoj. Ĉiuj tamen atendis la plej interesan festan programon.

La muziko ĉesis kaj la bruado kvietigis. Oni proklamis la maljunan instruiston kaj literaturiston Boris Popov plejaĝulo de la strato kaj dekoris lin per speciala rubando. Li dankis pro la alta honoro kaj alvokis la najbarojn demonstri sian arton. Elpaŝis unu post la alia kantistoj, humoristoj, dancantoj, muzikistoj. Konkurado en kantado, popola „mensogado“ kaj dancado de plenkreskuloj kaj infanoj. Ĉiuj fiksigardis ilin. Aŭdigis kuraĝigaj krioj.

La suno malaperis malantaŭ la monto, sed la festo daŭris sub la diverskoloraj girlandoj el elektraj lampoj. Apenaŭ meznokte disiris centoj da loĝantoj de strato „Esperanto“, feliĉaj kaj kontentaj pri sia festo, kiu amikigas la homojn.

Ivan KOLAROV

LANDA ARANĜO

En junio okazis en Dimitrovgrad landa E-renkontiĝo, dediĉita al la 100-jara datreveno de la gvidanto de nia popolo Georgi Dimitrov.

Dimitar Haĝiev — prezidanto de la bulgara MEM-Komitato, faris raporton pri la agado de G. Dimitrov defende al la paco.

Poste lernantoj-esperantistoj sub la gvido de Petra Petrova plenumis literaturan-muzikan programon. Kaj infanoj de la urba infandomo „Detelina Minčeva“ prezentis teatraĵeton. Multe impresis la publikon la plenumoj de trakia ensemblo el Haskovo.

La partoprenantoj en la renkontiĝo metis florkronon kaj florojn antaŭ la monumentoj de Georgi Dimitrov kaj de d-ro L. L. Zamenhof.

La esperantistoj vizitis la parkon „Penjo Penev“ kaj la planetarion.

Neli ABAĜIEVA

AKTIVIĜO EN MIHAJLOVGRAD-DISTRIKTO

Dum la lernojaro 1981-82 Esperanto estis instruata fakultative en du kursoj de la Ekonomia Teknikumo „V. Levski“ — Mihajlovgrad. En aliaj kvar kursoj, organizitaj de la estraro de la urba E-societo „Septembra Gloro“ la Internacian Lingvon lernis ĉ. 80 instruistoj, lernantoj, oficistoj kaj laboristoj.

El la finlernintoj de unuagradaj kursoj 11 gekursitoj partoprenis ĉi-somere la Internaciajn Instruistajn E-Kursojn en Pisanica, Smoljan-distrikto. Ili preparis sin instrui Esperanton dum la lernojaro 1982-83. E-kursoj okazos en Lom, Metkovec, Berkovica kaj Varšec. La Internacian Lingvon oni instruos fakultative en iuj mezlernejoj, kaj en novembro ekfunkcios civitanaj kursoj por I kaj II gradoj kaj kursoj en kelkaj entreprenojoj de Mihajlovgrad.

N. TIŠKOVA

E-KLUBO EN ALUMINIA KOMBINUMO

Pasis nur duonjaro, de post kiam grupo da simpatiantoj de Esperanto, laborantaj en la Ekonomia Kombinumo por Prilaborado de Aluminio „Stamen Stamenov“ — Sumen, ekternis ĝin. La unuaj rezultoj ne malfruigis.

Sukcese finiĝis la kurso por komencantoj gvidata de la multjara aktiva esperantisto kaj kursgvidanto Ilija Andreev. Ĉe la ekzamenoj bonajn sciojn elmonstris Tanja Angelova, ing. Ivan Kostadinov, Todorka Georgieva, Kalinka Kirova k. a.

Antaŭ nelonge ĉe la kombinuma kulturdomo estis fondita E-klubo. Ĝi celas unuigi kaj organizi la geesperantistojn, laborantajn en la kombinumo, manifesti ties kolektivajn kaj individuajn agadon konforme al la decidoj de la XII kongreso de BKP kaj la IX kongreso de la Bulgaraj Sindikatoj pri ĉiufanka evoluo kaj realigo de la homa personeco. La malnovaj kaj novaj esperantistoj unuanime decidis doni al la E-klubo la homon „Metalurgo“. Oni elektis estraron kun prezidanto — ing. Ivan Kostadinov. La membroj akceptis regularon kaj agadplanon. Kreiĝis kontaktoj kun esperantistoj, laborantaj en la aluminiaj uzinoj en la urboj Szekesfehervar (Hungario) kaj Deĉin (Ĉeĥoslovakio). La klubanoj aktive partoprenos la celebradon de la 75-jara jubileo de BEA kaj 60-jara jubileo de Sovet-Unio.

La unua jam plenumita tasko estis la dissendo al dekoj da eksterlandaj esperantistoj de la Malfermita Letero de l'Distrikta Estraro de BEA kaj la Distrikta Komitato pri Pacdefendo — Sumen, okaze de la 100-a naskiĝtago de Georgi Dimitrov.

Sv. STOJANOV

Noto de la Redakcio

La fotojn pri la 75-jara jubileo de BEA faris nia samideano Zdravko Nikolov el Veliko Tarnovo.

Sur la unua kovrilpaĝo: Vidaĵo de urbo Veliko Tarnovo

Karaj legantoj,

Ne forgesu, ke la lasta dato por aboni al „Bulgara Esperantisto“ per la Ŝtata Entrepreno por Disvastigo de la Gazetaro (REP) estas la 1-a de decembro 1982.

La bulgarioj devas fari sian abonon per REP, kaj la fremdlandanoj — ĉe la peranto de „BE“ — en sia lando, aŭ sendante la abonsumon per ĉeko rekte al la adreso de la redakcio — BG-1303 Sofio, bul. Ĥristo Botev 97, Bulgario.

La abonprezo de „BE“ por 1983 estas: por Bulgario — 2,90 levoj, por socialismaj landoj — 5,42 levoj, por ne socialismaj landoj — 5,90 levoj (5 usonaj dolaroj aŭ egvaloro en nacia valuto).

LA REDAKCIO

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI, prof. Vasil ĈOĈOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN, Flori NIKOLOV

Administranto — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“


Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1000 Sofio

tel. 31-70-19

Presejo „Georgi Dimitrov“ (II bazo)

BANKJA



Tiu ĉi banloko pentrinde situas en la piedo de monto Ljulin, je 18 km okcidente de la ĉefurbo Sofio. Klimato milda, sen subitaj ŝanĝoj de la temperaturo vintre kaj somere. Sed la plej granda riĉaĵo de Bankja estas la mineralaj fontoj, kiuj, kune kun la bonegaj klimatkondiĉoj, allogas milojn da bulgaraj kaj fremdlandaj turistoj. La kuracaj kvalitoj de la mineralaj akvoj estis alte taksataj jam de la antikvaj romianoj. Eĉ la nomo mem de la banloko — Bankja, originas de la latina vorto „balneum“, kio signifas banejon.

Dum esplorfadoj en la ĉirkaŭaĵoj de Bankja estis malkovritaj ruinoj de romiaj konstruaĵoj kaj kanalaro, atestantaj pri tio, ke tie ĉi estis multaj mineralaj fontoj. Kelkaj el ili malaperis, sed la ĉefa fonto de Bankja restis, kaj tiu ĉi loĝloko neniam ĉesis ludi la rolon de kuraccentro. La konkero de Bulgario fare de la turkoj bremsis la evoluon de Bankja

kiel banloko. La loĝloko estigis posedaĵo de turkaj nobeloj kaj de iliaj heredantoj. Lasta mastro de la loĝloko estis altranga oficiro de la turka armeo, kiu post la Rusa-Turka Milito en 1877–1878 forlasis Bulgarijon. Post la liberigo de la lando el sub la turka jugo, komenciĝis bonkonstruado de la tuta loĝloko. Estis konstruitaj novaj banejoj. La plej granda kuracbanejo estis konstruita laŭ projekto de la germana profesoro Godeher.

Bankja havas pli ol sep mil loĝantojn. Tie ĉi estas konstruitaj centoj da vilaoj, multaj bansanatorioj, hoteloj kaj restoracioj. Dum la someraj monatoj funkcias mineralakva subĉiela naĝbaseno. En la banloko troviĝas bone ekipita polikliniko kun alte kvalifikita personeco. Tie ĉi funkcias ankaŭ centro de rehabilitacio de kardiovaskulaj malsanoj kaj specialigita sanatorio por infanoj malsanaj je reŭmatismo.

La minerala akvo en Bankja apartenas al la homeoterma. Ĝia temperaturo ĉe la akvokaptejo estas 34–38°C. Laŭ sia kemia konsisto tiu ĉi akvo estas hidrokarbonat-sulfatnatria. Ĝi estas klara, sen odoro, kun agrabla gusto. Ĉe sistema bano en bankuvo, kelka kvanto de la mineralaj substancoj, entenataj en la akvo, penetras tra la haŭto en la sangon.

En tiu ĉi banloko estas sukcese kuracataj malsanoj de la koro kaj la vaskularo. Tre bonan efikon havas la kuracado de la hipertensio (hypertensio — tensio arterialis). Post kelkaj banoj en bankuvo la sangopremo komencas normaligi, ĉesas la kapdoloro, la sendormeco, la palpacio (palpitatio cordis); oni reakiras la laborkapablon.

La minerala akvo de Bankja efikas favore ĉe kuracado de malsanoj de la nervaj funkcioj, sendormeco, neŭrasteno, psikperturbadoj, gastroenterito, klimakteraj perturboj ĉe la virinoj, tireotoksikozo (thyreotoxicosis).

La vasta amplekso de malsanoj indikataj por kuracado en la banloko Bankja havigis al ĝi grandan popularecon. Dum la tuta jaro la banloko akceptas gastojn el la lando kaj ankaŭ el eksterlando.

Laŭ la fervojlinio Sofio–Bankja veturas speciala trajno — ĉiujn 40 minutojn. Krome Sofio estas ligita kun banloko Bankja per aŭtobusaj komunikoj. Laŭ la asfaltita ŝoseo Sofio–Bankja veturas aŭtobusoj je intervaloj de 15 minutoj, kaj per leĝera aŭto la distanco de Sofio ĝis Bankja estas 10–15 minutoj.